

Boletín

Federación Española de Esperanto
Asociación de Utilidad Pública

HEF

Valencio
1947

Valencio
1997

50-jara

N-ro 329 • Januaro - Februaro 1997

Boletín

BULTENO DE HISPANIA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9.ª C
Es-50002 Zaragoza

Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13-3º-7
Es 28015 Madrid
Tel. +faksilo: +34-(9) 1-446-80-79
esperanto@canaldinamic.es

Estraro


Prezidanto: Antonio Alonso Núñez
Vicprezidanto: José M. Galofré Domingo
Sekretario: Manuel Parra Benito
Vicsekretario: Marcos Cruz Martín
Kasisto: José M. Bernabeu Franco
(konto: 14.011.966, Caja Postal)
Vocdonantoj:
Luis Hernandez García
Antonio Marco Botella
Juan Antonio Cabezas
Augusto Casquero de la Cruz
Miguel Gutiérrez Adúriz

Kovrilo: HEF - pioniroj

Nota: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Enhavo

HEF 50-jara	3
Esperanto-disko lamtame lanĉita	6
56-a Hispana Kongreso	9
En HEF al Internet	10
Ada ĉiam kum ni!	13
Deziras korespondadi	14
Memorinda K-do Adonis (AMB)	14
Viglas la movado	15
Perkoresponda kurso de HEF	20
La dek plej belaj vortoj en etno lingvoj kaj artefaritaj lingvoj	21
Eia promeno tra la gastronomio de PIV	23
La kazo de Bonauro	26
Literatura Konkurso	30
La nova papiro (J. de las Heras)	32



HEF 50-jara

LA 50a DATREVENO DE LA NASKIGO DE HEF

Antonio Marco Botella

Post terura intercivitana trijara milito kaj ankoraŭ pli dura postmilito, kiam malamo, mizero kaj malsato regis en la tuta Hispanio, en 1947, naskiĝis Hispana Esperanto-Federacio...

Inter la brumoj el maljusto, oni serĉis padojn de paco kaj konkordo. Sed tio estis tre malfacila tasko, kiam tiom da doloro regis en la turmentita koro de tiom da miloj de patrinoj.

Esperanto ne estis, kiel eble estas nun, lingvo internacia por solvi interesojn pli aŭ malpli valorajn de la socio. Esperanto estis ja idealo de paco kaj interkompreno, kaj la oficialigo de la internacia lingvo signifis por la esperantistoj kulminon de unu el niaj plej karaj esperoj.

Por ĝuste taksu tion kion ĝi signifis, ni diru tuj, ke nia Federacio estis en Hispanio, ekde tiu momento de ĝia oficialigo, la sola kultura asocio, la unika

pacema idealo sub formo de societo permesita ekster la strukturo de la ŝtato, t.e., organismo nedependanta de la oficiala ministerio, kiu regulis la disvolvon de kulturo kaj sporto en nia lando. Dum unu tuta jaro, la esperantistoj, ne oficiale organizitaj, sed unuiĝintaj en sia unika celo atingi la oficialan ekzistojon, saĝe gvidate de la prudento de D-ro Rafael Herrero kaj Luis Hernández, solide helpate de atentinda alta nombro de bonkoraj progresemaj homoj, rezistis la solan oferton de la administracio: aparteni al tiu ŝtat-aparato aŭ nenion. La respondo de la esperantistoj estis, senŝange, ĉiam la sama: sendependaj aŭ nenion!

Fine, la 15an de decembro de 1947, ĝuste la tagon de Zamenhof kaj kvazaŭ simbola atingo, Hispana Esperanto-Federacio estis oficiale akceptita de la aŭtoritatoj kiel la sola asocio permesita instrui kaj disvastigi la internacian lingvon Esperanto en la tuta Hispanio. La realo ŝajnis tute nekredbla!

La oficiala sidejo de HEF estis Valencio. Kvankam la provizora HEF-estraro speciale kreita por efektiviĝi la demarŝojn de la oficialigo kaj posta kontakto kaj kolektiĝo de la esperantistoj el ĉiuj hispanaj regionoj estis, kiel dirite, provizora, tamen ĝi plu gvidis zorge kaj prudente, ĝis la fino de 1949, kiam la unua

Carlos Martínez



D-ro Rafael Herrero



D-ro F-do de la Puente



Rafael Fiol Paredes



HEF-estraro estis balote elektita. Ĝi konsistis el jenaj gesamideanoj:

Prezidanto: Manuel Caplliure Ballester, el Valencio.

Vicprezidanto: Federico Giménez Rivelles, loĝanta en Sevilo.

Sekretario: Vicente Santamaria Llorens, el Valencio.

Vicsekretario: Sebastian Chaler Arnau, el Terrassa.

Kasisto: Francisco Roglá Orrico, el Valencio

Voĉdonantoj: D-ro Daniel Llorens Sastre; Miguel Ribas de Pina Vives; f-ino Maria Casanovas Jarreta kaj Fernando Monserrat Boronat.

Estus pli ol naiva penso, konjekti, ke post tiu oficiala permeso cio funkcios kvazaŭ sur reloj, ho, tute ne! la problemoj, precipe la politikaj kaj ekonomiaj estis ne nur multnombraj sed ofte eĉ nesolveblaj. Ni metu kiel ekzemplon unu el ili, ke malgraŭ la oficialigo de HEF fare de la registaro por la tuta lando, en diversaj provincoj la permeso malfermi rondon estis rigore malpermesita de la respektivaj provincestroj, sendube politike pli radikalaj ol la registaro mem.

Iom post iom, kun pacienco kaj laboro senlimaj, HEF progresis kaj progresis: en 1949 aperis la unua numero de nia organo *Boletín*. Publikigi bulteneton en tiuj tagoj estis vera miraklo pro mil kaj unu motivoj kiujn oni ne bezonas detali. La unuaj bastionoj de Esperanto en nia lando estis Valencio, Zaragozo, Terrassa, Sabadell, Bilbao k.a. Sed ekzistis aliaj urboj kiujmeritas la honoron aperi inter la unuaj, tamen la netoleremo de

certaj aŭtoritatuloj firme baris ian ajn projekton.

En 1951a, post granda penado kaj senfinaj malhelpoj okazis en Terrassa la 12a Hispana Esperanto-Kongreso, unua post la intercivitana milito.

La sola anonco de tiu Kongreso ŝajnis veki la entuziasmon de malnovaj Esperantaj kolektivoj kaj multnombraj skeptikaj hispanaj esperantistoj kiuj, sen diskriminacio de politikaj opinioj aŭ religia kredo pensis ke tio estis nerealigebla revo. Kaj ĉiuj sin preparis por tiu granda publika evento. Sed la politika situacio estis ankoraŭ tre, tre malfacila kaj obstine negativa, tiom, ke la monatoj pasis kaj la koncerna permeso de la Ministerio pri Internaj Aferoj ne venis. Oni perdis la esperon okazigi ĝin kaj la HEF-estraro, antaŭ tiu eventuala fiasko publikigis alvokon indikante, ke kvankam la oficiala permeso preskaŭ certe ne venos, la esperantistoj kunvenos private, probable en Barcelono...

Sed fine, en la lasta momento, la permeso venis kaj tiu estis (almenaŭ por mi kaj kelkaj centoj da junaj esperantistoj) unu el la plej emociigaj kaj agrablaj momentoj de nia vivo: unuafoje post longaj jaroj, esperantistoj el la tuta lando, junaj kaj maljunaj renkontiĝos, interkonatiĝos, frate konversacios kaj ĝoje kunkantis en Esperanto dum la ekskursoj katalunoj kaj alikantanoj.

Kaj tiel estis: Terrassa, plenplene kontentige plenumis sian gasteman rolon, kaj la loĝantaro akceptis ninper klare

raj elmontroj de simpatio. La junularo, eĉ la neesperantistoj, estis kun ni kaj oni povis vidi la fenestrojn kaj balkonojn ornamitajn de girdaloj, ornamajoj kaj verdaj standardoj. La manifestacio surstrate kunportis niajn flagojn kaj nian ĝojon! Estis ja la festo de la geesperantistoj de nia tuta lando! Tiuj tagoj en Terrassa restos por ni tute neforgeseblaj...



Luis Hernandez

Sed, karaj legantoj kaj amikoj, senkulpiĝu min se mi, eble impulsite de la entuziasmo de belaj junecaj rememoroj preterpasis la celon nur ekzalti la 50an datrevenon de la naskiĝo de HEF kaj, vole-nevole, elvokis iom pli detale ol konvenas al simpla artikolo, horojn memorindajn de nia historio. Feliĉon do, al nia membraro en la 50a datreveno de HEF, kaj kuraĝon al niaj estontaj responsuloj, kiuj tuj post la ĝenerala asembleo de la venonta hispana kongreso okazonta en Valencio gvidos la venontan etapon de HEF, eble tiel malfacilan kiel la ĝisnuna, sed kun alia karaktero tute malsama, ja la tempoj estas aliaj!

Ĝuste en tiu ĉi jaro kaj post du mandatoj sinsekvaj, la nunaj estraranoj devas forlasi siajn respektivajn postenojn: la prezidanto Alonso jam anoncis sian decidon ne akcepti la reelekton eĉ en kazo de insista propono, kaj la ĉefredaktoro de *Boletín* koincidas en simila decido. En tiu ĉi kazo la decido devas esti pli firma: ĉar via redaktoro jam estas 75-jara kaj kun nesolida sano, ŝajnas pli ol logika la forlaso, ĉar li komencis la redaktadon en 1989 kaj dum pluraj jaroj

Boletín de HEF

redaktis du E-revuojn, kaj tio estas tre longa periodo por tiel peniga kaj izola tasko, precipe se al ĝi oni aldonas aliajn verkadprojektojn.

Al la graveco de la 56a Hispana Esperanto-Kongreso pri kiu ĉiu hispana esperantisto certe konscias, oni devas aldoni la samtempan okazigon de la 7a Internacia Esperanto-Kongreso kaj la 7a Eŭropa Esperanto-Forumo. La kongresanoj, krom prelegoj, debatoj, kunvenoj ktp. havos la eblecon ĝui ĉiun aranĝon de la Foiro de Julio de Valencio, kaj de la Internacia Festivalo de Blovorkestroj, kiuj koincidas kun samaj datoj de la kongresoj okazantaj de la 8a ĝis la 13a de Julio 1997. Kompreneble, ne mankos en tiuj kongresoj: kursoj, prelegoj, teatro, folkloro, klasika muziko kaj eksterordinaraj belaj ekskursoj al la plej allogaj lokoj de nia lando...

Hispana Esperanto-Federacio invitas ĉiujn siajn membrojn kaj ĝenerale ĉiujn

esperantistojn al tiuj historiaj kongresoj kaj proponas vin ĉiuj aliĝi al tiu memoriginda renkontiĝo de esperantistoj en Valencio.



ABONU KAJ ABONIGU
EL POPOLA ĈINIO

**Abontarifo por 1997
3.500 ptoj**

12 numeroj jare. 52 paĝoj ĉiunumere. Informoj pri la E-movado tra la mondo. E-rubrikoj. Aktualaj raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio.

Sendu poŝtmandaton al Felix Gómez Martín
c/ Corbeta 8 - 5-A; 28042 Madrid; tel: 91-7472378
aŭ al via kutima peranto

Esperanto-disko tamtame lanĉita

Marcos Cruz

De antaŭ du tagoj sonas ĉiutage en muzikradioj de tuta Hispanujo disko en Esperanto. La verko mem nomiĝas Esperanto, kaj estas eldonita de Warner Music Spain. Ŝajne ĝi lanĉiĝis samtempe en multaj landoj, kvankam mankas konfirmo.

Eble iu el vi aŭdis diskon nomitan "Angelis" far "Elbosco", eldonitan plurlande en 1995, kantitan latine kaj angle far infanaj korusoj. Ĝi furoris, kaj pecoj el ĝi reaperis en diversaj kompiloj; nur en Hispanujo vendiĝis 250 000 ekzempleroj.

Nu, la sama komponisto-produktisto kiu ĝin realigis, konata en nialandaj profesiaj radio- kaj muzik-medio, venis februare al Hispana E-Federacio por peti helpon por nova projekto kiun li elpensis: disko en Esperanto kaj en la angla, kantota de diverslandaj korusoj, kun muziko adaptita el klasikaj komponaĵoj.

Simpatianto de Esperanto sed neparolanto, li volis mem verki la tekstojn, elĉerpante el diversaj

fontoj. Li neniel akceptis nian proponon ke la tekstojn (kun)faru esperantistoj. Li volis nian helpon nur pri tekstokorektado kaj prononcado, por certigi ke la rezulto estos senmanka. Por tiu laboro li ofertis pagi sumon al la asocio. Por komenci ni do provizis lin per diversa materialo dulingva, en la hispana kaj en Esperanto.

Pasis tempo. Ni kontaktis telefone plurfoje, sed nura respondo estis, ke li plu laboras pri la muziko, kaj ke en siaj dumaj privataj kaj laboraj vojaĝoj li provizis sin per pli kaj pli da Esperanto-materialo en pluraj lingvoj, por plu prilabori la tekstojn.

Unufoje ni estis invititaj en la sonstudion por aŭdi provon de la du unue komponitaj kantoj ("Universala Naturo" kaj "La rido"). La tekstoj havis erarojn kaj la prononcado ne estis bona, sed ĝenerale la afero ŝajnis esperdona, kvankam ni ankoraŭ ne tute kredis je ĝia vera dimensio. La skipestro promesis, ke ni povos trakorekti ĉion tuj kiam ĉiuj kantoj estos finitaj.

Efektive, fine de julio li neatendite telefonis, ke li urĝe bezonas nian tujan helpon. Ĉiuj kantoj estis jam finitaj. Li eĉ konvinkis la kompanion, ke la disko estu nure en Esperanto, sen angla. Malgraŭ ankoraŭaj eraretoj, la tekstoj estis ĝenerale sufiĉe bonaj.



Li verkis lin kopie-refande el diversa materiĵo pri kiu li ne volis rakonti; nur la Ĉarton pri Homaj Rajtoj kaj la Koranon li menciis.

Ni helpis adapti la tekstojn al la muziko. Estis tre pena tasko, ĉar li neniel akceptis verajn ŝanĝojn. Apenaŭ nur uzon de sinonimoj, apostrofoj kaj ŝanĝon de vort- kaj fraz-ordo ni rajtis, dum foje indus reverkado. Dum du etose tre streĉitaj vespereoj ni faris en la sonstudio nian plejan eblon, ĉar ni ne disponis pri pli da tempo. Je la fino restis

non, kaj petis nin aranĝi tuj la kontaktojn. Same, ĉar ili bezonis tradukon en la anglan de ĉiuj tekstoj, ni tuj proponis fari pere de la brita asocio, kion ili same akceptis.

Ni tuj kontaktis la koncernajn E-asociojn telefone, fakse kaj retroŝte. Ili reagis rapide kaj kunlaboreme. Ni ofertis al ili kundividi la monon ricevotan pro la laboro, kaj petis de ili disponigi ĉian eblan rimedon por la sukceso de la afero. S-ro Martyn McClelland, el la oficejo de BEA tradukis kaj refakis la tekstojn;



s-roj Kiril Popov kaj Peta^r Todorov zorgis pri la helpo en Sofio, fine de aŭgusto, kaj s-roj Aleksander Korjenkov kaj Viktor Kulakov en Moskvo, meze de septembro. Nur la plano pri Havano fiaskis, pro manko de interkonsento inter la produktistoj kaj la kuba sonstudio (kvankam, strange, sur la disko estas menciita Havano inter la registrolokoj). Aliloke oni registris fonajn kaj atmosferajn voĉojn kaj sonojn, sen rilato al Esperanto.

registrita pseŭdokantado modela por la definitivaj korusaj registradoj. Iom poste ni donis al ili tre detalajn skribajn kaj sonkasedajn klarigojn pri la pronocado de ĉiu kanto. Laŭplane la tekstoj kantotis de profesiaj korusoj en Sofio, Moskvo kaj Havano. Ni proponis, ke kompetentaj surlokaj esperantistoj ĉeestu por helpi kaj konsili dum la registradoj. Ili entuziasme kaj danke akceptis la propo-

La registradoj en Sofio kaj Moskvo estis plene sukcesaj. Ambaŭkaze la skipo revenis madriden tre kontenta pro la rezulto kaj favore impresita de la kompetenta helpo de la lokaj esperantistoj.

Post tio nia kunlaboro restis preskaŭ finita. Mankis nur revizii la kompostitajn tekstojn kaj ĝenerale la diskokajeron, por forigi eblajn erarojn kaj mistajpojn (kvankam ni donis ĉion diskede

kun tiparoj kaj instrukcioj). Dume ili miksadis la muzikon kun la voĉoj. Lasta informo de ni ricevita estis, ke la diskon oni lanĉos antaŭ kristnasko en la tuta mondo, kaj ke ni ankoraŭ ne rajtas paroli libere pri la afero, do ni plu atendis.

Sed subite la 16an de novembro amiko telefonis min, ke li hazarde ĵus aŭdis en radio kanton el la atendata disko, tre favore prikomentitan de parolisto dum minutoj. Mi supozis, ke komenciĝis nur la antaŭdisvastigado en radiomedio por kontroli la publikan reagon, antaŭ la komerca produktado. Rea telefonado al la produktistoj, sen reago. Unu tagon poste la sama amiko retelefonis, ke li senprobleme trovis kaj aĉetis la diskon en muzikvendejo!

Iel desafortis nin la sinteno de la produktistoj. Post la momento kiam nia helpo ne plu necesis, ili ne plu kontaktis nek reagis niajn kontakto-klopodojn. Ili petis de ni ankoraŭ ne paroli libere pri la afero, pro komercaj kialoj, ĝis averto. Tamen la disko aperis sen averto!

La kajero enhavas la originalajn tekstojn en Esperanto kaj tradukojn en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj (verŝajne) japana. La aspekto kaj aranĝo estas tre bonkvalita. La muziko estas tute sintetizila, moderna adapto kaj reverko de klasikaj pecoj ne tre konataj por la ĝenerala publiko. La nura tre konata melodio estas "Odo al ĝojo" de Betoveno (kanto "La rido").

Ĉiel ajn, la grava afero estas, ke la disko jam disponeblas en ĉiuj vendejoj

de Hispanio. Ĝi estas tamtame reklamata en la ĉefaj televid-kanaloj, pli ol ducent reklamoj en pintaj horoj! Cetere ne nur la du ŝtataj kanaloj uzis ĝin por muzikigi propran kristmaskan reklamon, sed ankaŭ la grupo da entreprenoj apogantaj la hispanajn sportistojn en la Olimpikoj uzis la kanton "La rido" por muzikigi sian belegan televidan reklamon, ĉiuj plurfoje dissenditaj. Ankaŭ la reklam-folioj de la ĉefaj magazenoj prezentas la bildon de la disko kaj ĉiuj muzikaj radiostacioj de la lando disaŭdigas la diskon kun aparta klarigo pri Esperanto, tio estas miloj da informoj ĉefe direktitaj al gejunuloj. Kaj nun, la deksesan de januaro oni lanĉos la diskon en aliaj landoj.

Nun la sukceso de la disko dependas parte de ni mem. Necesas ne nur aĉeti ĝin, sed peti ĝin plurfoje en diskovendejoj kaj de radiostacioj, ree kaj ree. E-asocioj faksu al radioj kun bonaj sed koncizaj informoj pri la lingvo; tiel la komentoj de la radioparolistoj estos pli informhavaj (jam okazas en Hispanujo, ke oni prezentas en radio la kantojn kun sinteno favora al Esperanto sed kun tipaj antaŭjuĝoj aŭ neĝustaj esprimoj); certe atingeblos multaj intervjuoj kaj artikoloj.

Kredeble ĉiu esperantisto komprenos la gravecon kiu ĉi disko havas por nia afero, se nur pro la fakto ke multege homoj aŭdos unuafoje pri Esperanto kaj Esperanton, kun kvalito, en medio kaj laŭ vasteco ĝis nun nealireblaj al la movado.



REINVITO AL VALENCIO

Apud trankvila kaj blua bordo,
kiel fantazia bildo, senpar',
kuŝas Valencio, de l'ĉiel' la pordo,
bela reĝino de l' mont'al mar'.

Blua la ĉielo kaj senmakula,
krom de la steloj, —brila trezor'—,
pura l' aero, kiu milda, lula,
nestas polenon en bonodor'.

La bela oranĝo, en oferemo,
pendas tentanta, kiel ora pom',
dum belulinoj, per milda tremo,
skuas la florojn —reviga arom'!—.

Per dolĉa blovo dancas la palmo
kaj la vinberoj, en rava sent',
dum birdoj kantas, en ritma psalmo,
al la virinoj de nia Orient'.

Tiu poezia vivanta bildo
estos por vi la altira adres'
kaj la fincel' de paca gildo,
per Esperanto frata kongres'.

Venu, do, karaj samideanoj,
de Hispanlando kaj eksterland';
kunaj la koroj, kunaj la manoj,
ni faru blokon por pac' kaj am'!

D-ro Rafael Herrero. ŝ (Valencio)

En la historio de la Esperanta Mova-
do en Valencio kaj Hispanio, la figuro de
D-ro Herrero restas por ĉiam viva,
ekzemplodona. Okaze de la 50a datreveno

no de la fondo de HEF, ni volas elvoki la
esperantiston, kiu, elegante kaj senlace
sciis diri ĉiam la ĝustan frazon por allogi
la novulojn kaj plifirmigi la konvinkojn
de la veteranoj. Lian agadon ni neniam
forĝosoj!



56a HK

Valencio 8a — 13a de Julio 1997

Konstanta adreso: Grupo Espe-
ranto de Valencio, Gran Vía Fernádo
el Católico, 45, 3a, ES-46009 Valen-
cía

Tel/Faksilo 96-3849616

Kontonumero: 2077 0069 24
3100702329 ĉe Bancaja, calle Mála-
ga, 37, Es-46009 Valencía

Ni lernas Esperanton per la perkoresponda kurso de HEF



Ĉu HEF al Internet?

Miguel A. Sancho (1)

Mia kompreno pri la reto

La pasintan jaron mi devis deĵori kiel teknikisto en la budo, kiun mia entreprenon starigis en iu konata foiro pri informadiko. Mia estro esperis la ĉeston de pluraj estontaj klientoj, kiuj ofte petas teknikajn detalojn malfacile klarigeblaj de normala vendisto. La prognozo estis tamen erara, ĉar tiam estis festotago, kaj nur promenantaj familioj kaj ludemaj infanoj invadis la kongresan palacon. Neniu kompreneble interesiĝis pri ajna teknika detalo de nia programaro. Aliaj entreprenoj atingis aliflanke la atenton el la plejmulto de la ĉeestantoj, ĉefe el la junaj: tiuj disvendantaj ludojn aŭ luantaj aliron al Internet.

Post kelkaj horoj la enuo en soleco fariĝis neeltenebla kaj mi decidis profesori al infanoj kiuj maltrafe scivolis en nia budo. Sed temis pri nova eraro ĉar ili ja sciis ĉion pri la afero: per Internet eblas atingi pli detalajn informojn pri piratado de novaj ludoj; klarigojn pri la maniero venki en la antikvaj; spekti nudan virinon, eĉ en pluraj milionoj da koloroj se via modemo estas rapida; fiparoli anonime, prefere al eksterlandano; koni la temon de la ĵus aperinta kinprodukto kaj multaj pliaj mirindaĵoj, por kies klarigo mi ne havas sufiĉan pa-

peron. Tiaj pensoj ja ŝokis min, ĉar mi atingis malsimilajn konkludojn post ne-longa uzado kaj kreado en la reto.

Antaŭ du jardekoj astronomoj kaj ĝenerale fizikistoj, kiuj jam funkciis kiel neformale organizita internacia rondo, konstatis ke la evoluo de ilia disĉiplino dependis de rapida disvastigo de novkonataĵoj inter kolegoj. Ili komencis profiti la unajn militistajn kaj universitatajn retojn kiuj konektis komputiulojn tra la mondo. Iom poste, kelkaj informadikistoj el la Centre Européen pour la Recherche Nucléaire —Eŭropa Centro pri Nuklea Reserĉado—, en Ĝenevo, elpensis primitivan komputilan lingvon por la kreo de teksto-paĝoj, videblaj tra la reto, por la disvastigo de sciencaj informoj.

La afero disvolviĝis rapide kaj komplekse. La lingvo, nomiĝanta HTML, kvankam facile lernebla por neprofesiuoj, ricevis plurajn pliriĉigojn, tiel ke la paĝoj povu enhavi bildojn kaj resti ĝenerale belaspektaj. Aliflanke, la reto atingis multajn landojn, en kiuj ĝenerala publiko aliras ĝin telefone kontraŭ malgranda kosto. Artistoj kaj neteknikaj kleruloj komencis interesiĝi. Fine de tio, haose, sub neregistrara gvido, laŭ nedirektita kresko, aperis la tiel nomata TutTera Teksaĵo (World Wide Web), konsistanta en enorma interkomunikado de privataj, publikaj kaj anonimaj paĝoj kun ĉiaj informoj, absolute demokrate alireblaj de ĉiu mondano per tre simplaj koputilaj rimedoj.

Temas, do, pri la unua provo pri universaligo de la homa kulturo, pri ne haltigebla transiro de informoj kaj konoj, pri eksterordinara povo, pri nenies propraĵo. Io tia ja atentigis registrarojn kaj entreprenojn, ke la reto estas grava ilo por iliaj celoj. Antaŭ kvar jaroj, la usona vicprezidanto Al Gore pretigis programon celantan ampleksigi mondajn komunikojn por atingi kion li baptis informaj rapidŝoseoj, al kiu la Clinton-a Administracio dediĉos eksterordinaran investon.

Ne necesas pravigi ke aliro al la publiko estas la celo de ĉiu malfermita organizo, ĉu komercprofita aŭ sociserva.

La reta medio aspektas facila sed ne konkludu ke ajna prezento de informoj en ĝi produktos la deziratan celon. Milionoj da paŝoj troviĝas dise sur la teksaĵo, kaj ĉiuj ili konkuras kapti la atenton de iea homoludanta per sia komputilo. El tiuj milionoj, duono restas legataj nur de iliaj aŭtoroj.

Konkuri en tiel kruela medio eblas nur per tri rimedoj: bona enhavo, racia kaj komprenebla strukturigo de la enhavo, kaj altira, sed eleganta, beligo de la strukturo. Malbona paĝaro produktas plejofte nelegadon de la vizitantoj. Dramo ja tamen estas ke tiuj malmultaj legantoj ricevas tute misan mesaĝon. Nu, ni konkludu ke nur per profesia laboro eblas taŭge kontakti la publikon.

Kio pri paĝaro de HEF?

Laŭ tiuj kondiĉoj, ĉu eblas al HEF havi sian propran paĝaron en la reto? Ni vidu ke tia projekto estas modeste alirebla.

HEF rilatas aferon, Esperanto, kiujn ni ĉiuj, ĉar esperantistoj, konsideras interesa kaj publikiga. La lingvo mem estas alloga, sed estas io plia: ĝia kulturo. Tio lasta estas ja bona enhavo. Sed HEF estas organizo kies celo estas servi la socion, en kiu ĝi tute malferme enkadriĝas. Por tio ĝi havas servojn, certe ne sufiĉaj, sed ĉiuj el ili interesaj por la publiko.

La Federacio penis en la lastaj jaroj modernigi siajn broŝurojn kaj informilojn. Ili pritraktas ĉion antaŭe priskribitan. Kaj kvankam ĉio restas plibonigebla, la

tekstoj estas taŭgaj kaj ĝenerale akceptataj de la esperanta komunumo. Ni danku multajn homojn por tiu profitdona laboro. Do ni ja akiris enhavon.

Dum la lastaj jaroj mi ricevis ekspertojn, interalie, pri la programado kaj strukturado de paĝoj por Internet, ne nur por komercaj firmaoj, sed ankaŭ por sociinformaj servoj. Mi proponis al HEF profiti tiun mian eksperton. La tutapogan reagon de Marcos Cruz kaj ceteraj membroj de la estraro mi sincere dankas (2).

Konsiderante ke plibonigo kaj plurhoma partopreno ĉiam estos necesa, ta-



men mi kuraĝas aserti, ne sen granda timo malpravi, ke ni ja havas strukturon.

Kvankam mi ne estas profesia desegnisto, mi al kutimiĝis uzi grafikajn rimedojn, tamen ne originalajn de artistika vidpunkto. Se ni sekvas komunan saĝon kaj kapablas imiti, sed ne kopii, ni ja povas havi modestan, ne kontraŭefikan, aspekton por la paĝoj. Eble oni povos ĝin plibonigi je profesia nivelo estontece.

Ĉar la unujara kosto por starigo de mezgranda paĝaro en la reto ne altas, ni atingas la konkludon ke la projekto eblas. Mi kuraĝas aldoni ke ĝi ankaŭ indas kaj endas.

La rezulto

Marcos Cruz kaj mi jam kreis tiun paĝaron. Vi povas ĝin atingi per jena adreso: <http://home.adv.es/esperanto>. Detaloj por retanoj malmankas ĉar ili mem povas ĝin trafoliumi. Tamen mi supraj ĝin prikribos por ceteraj legantoj.

De la unua bonvena kovrilo estas alireblaj du malsimilaj paĝaroj: tiu por esperantistoj kaj tiu, pli abunda, celanta informi eksteran publikon. La esperantista parto enhavas freŝajn movadajn novaĵojn kaj personajn mesaĝojn de la membraro. Legeblas ankaŭ adresaro de la hispanaj esperantistoj en la reto.

La ĉefa parto estas hispanligva kaj celas la ĝeneralan publikon. Sub tri grandaj titoloj —¿qué es?, ¿quiénes somos?, ¿qué ofrecemos?—, oni klarigas, kun abundo da bildoj kaj okulfrapaj mesaĝoj, kio estas Esperanto, lingve kaj

kulture; kion celas Hispana Esperanto-Federacio, per substreko de ĝia sociserva flanko; kaj fine oni priskribas la diversajn servojn de la Asocio, rektaj aŭ delegaciitaj, kiaj kursoj, libroservo, revuoj, informado, ktp...

Kritikoj, sugestoj kaj proponoj por kunlaboro estas bonvenaj kaj necesaj. Paĝaro estas dinamika kreo kiu devos evolui.

(1) La aŭtoro deĵoras kiel analizisto en mutimedia departamento de granda informadika firmao. Li partoprenis, interalie, la teamon kiu progamis la unuan tempo-realan kreadon de Internet-paĝaro por masiva disvastigo de voĉdonrezultoj, okaze de la pasintaj Generalaj Valotoj. (*)

(2) Mi deziras cetere publike danki al HEF-estraranoj kaj al aliaj amikoj pro ilia kortuŝa ricevo post mia malapero (ne kabeo!) de la movado antaŭ ses jaroj. Kompreneble, post tiom da tempo, mi ne povis esperi tian grandan fidon je miaj proponoj.

NOTO

La redaktoro de *Boletín*, samideano Antonio Marco Botella, informas al siaj gekorespondantoj pri la absoluta neeblo respondi la multnombrajn leterojn kiujn li ricevis lastatempe pro ĝena longa malsano. Mi tion faros iom post iom laŭ progreso de mia resaniĝo. Mi petas senkulpigon! A.M.B.

ADA ĈIAM KUN NI!

Augusto

Laŭdire, Ada Fighiera-Sikorska foriris. Tamen tio ne estas vero. Ĉu aero, aŭ idealismo, entuziasmo, amo, iam povas malaperi?

Mi rememoras kiam, antaŭ jaroj, en Madrida Esperanto-Liceo, mi havis la grandegan ĝojon konatiĝi kun Ada kaj Gian Carlo. Tio estis por mi krom granda honoro mejloŝtono de miavivo, ne nur esperantista, sed ankaŭ kiel persono. La vivo en nia esperantista asocio, ne nur en MEL, eĉ en la tuta hispana E-movado ŝanĝiĝis. Ekde la komenco ambaŭ estis niaj profesoroj, amikoj, gepatroj, ekzemplo kaj granda helpo. Ilia granda sperto kaj sindonemo fariĝis la bazo sur kiu ni konstruis asocion kiu transformiĝis en hejmon por ni.

Ada ĉiam estis preta klarigi, instrui, helpi en ĉio, ne hezitis se necese, eĉ balai la lokon. Ĉiam preta, ĉiam afabla, ĉiam sindonema, ĉiam amikeca, ĉiam humila. Ada kaj Gian Carlo, estis ĉiam

ekzemploj kaj speguloj por ni. En tiuj feliĉaj «konversaciaj rondoj» de ili gvidataj ĉiumerkrede, en ekskursoj, komunaj vespermanĝoj unufoje monate en la

klubejo, al kiuj Ada ĉiam kunportis frandaĵojn kuiritaj de ŝi mem ktp. ili ĉiam estis la koro. Kaj kion diri pri ilia helpo ĉama kaj konstanta al la hispana E-movado jen eldonante lernolibrojn por hispanoj, jen estante la solaj apogiloj kiuj sukcesis ke la Universala Kongreso en la jaro 1993 okazu en Hispanio, kontraŭ la teruraj malfacilaĵoj metitaj de kelkaj aliaj. Sen Ada kaj Gian Carlo neniam povus esti okazinta la UK en Valencio, kaj sen ilia helpo, konsiloj kaj sperto, neniam ĝi povus esti tiel sukcesa.

Nun kelkaj homoj povus pensi ke Ada estas tro kruela ĉar forlasis nin. Tute ne! Mi mem, kiam mi intencas ion organizi, kiam mi laciĝas aŭ mia entuziasmo lamas, aŭ kiam mi pensas ke niaj penoj eble ne valoras, mi rememoras Adan, entuziasma kaj sindonema dum sia tuta vivo, kiu neniam laciĝis ekde la kruelaj kaj malfacilaj momentoj de la infaneco, kiu ĉiam, eĉ en la plej komplikaj momentoj havis ridetantan mienon, kaj kuraĝe antaŭeniris, kaj mi pensas:

Kion farus Ada en ĉi tiu momento?, kaj laŭ tio mi intencas agi.

La ekzemplo konstanta de Ada, same kiel tiu de aliaj altruismaj kaj idealismaj homoj kiuj estis la motoroj de la mondo, devas ĉiam gvidi nin. Ŝi restas

por ĉiam kun ni, kaj ni ne rajtas fuŝi tion por kio ŝi kuraĝe batalis. Ŝi vivas en ni, ĉar multaj el ni estas la rezulto de la streboj de Ada. Ni klopodu meriti tion



4
kion ŝi faris. En la nuna materialisma mondo, en kiu la plej multaj, eĉ multaj esperantistoj, pensas ke ne valoras al-truisme labori, ni devas preni ekzemplon de Ada.

SALUTON, ADA, NI RESTAS EN KONTAKTO!



**Nun estas pli facile!
HEF**

Telefona kaj fakse

91-446-80-79

Rete (komputile)

esperanto@canaldinamic.es

Dezirata korespondadi

La Direktoro de la privata Lernejo "Muan-ga" de Kinshasa (Zairio), prezidanto de Zaira E-Rondo en la urbo, adresis dankan leteron al la Prezidanto de la institucio "Fernando el Kátolico" de la Zaragoza Provinca Deputitaro pro ricevo donace de unu ekzemplero de la verko *Lirikaj perloj de Al-Andalus*, de Antonio Marco Botella, kiu fariĝis la sola teksto por legado de la lernantaro. Li informas al nia redaktoro pri la komenco de E-kursoj en tiu Lernejo kaj petas al li informan materialon pri Esperanto en Eŭropo. Cetere, li deziras kontakti kun Eŭropaj geesperantistoj cele al korespondado kun zairiaj E-lernantoj. Lastajn ekzemplerojn de *Boletín* ni sendis al tiu Afrika lando. Interesatoj pri korespondado kaj sendo de E-materialo: Zaira Esperanto-Rondo; Av. Bongolo, n-ro 10, YOLO-Nord 3. B.P. 6055-KINSHASA VI. Zaire.

Memorinda k-do Adonis

A.M.B.

En la n-ro 327 de *Boletín*, ni informis nian legantaron pri la forpaso de Adonis González Meana, kies aktivado en la Esperanto-Grupo de Gijón estis tiel ekzemplodona dum multaj jaroj. Antaŭ kelkaj tagoj, tiu ĉi redaktoro ricevis leteron de la frato de Adonis, Alcibiades, ankaŭ elstara esperantisto. Kun emocio mi legis ĝin, ĉar li elvokas viverojn de kiam li mem instruis Esperanton al sia frato Adonis en la jaro 1950. La veteranoj, kiel mi mem, bone rememoras la entuziasmon de niaj asturaj k-doĵ kiam ili fondis la memorindan E-societon *La Verda Kolombejo*, en Ciaño-Santa Ana, kiun prezidis Alcibiades kaj kies sekretario estis Adonis. La aktivado de ambaŭ fratoj estis eksterordinara, ĉar ili ne nur faris artikolojn por *Boletín*, sed ankaŭ fondis la organon de la propra Grupo, *Heleco*. Do, krom E-gvidadode kursoj en la loka grupo, El Entrego, Sama de Langreo k.a. Adonis verkis la sufiĉajn artikolojn por aperigi la lokan bultenon. Kiam pro laboraj kaŭzoj, Adonis translokiĝis al Gijón, la esperantistoj de tiu urbo trovis en tiu entuziasma esperantisto unu el la plej efikaj kunlaborantoj por progresigi la E-movadon, kaj ne nur en tiu urbo sed en alia nacia nivelo, ja niaj samideanoj de Gijón okazigis sian unuan postmilitan kongreson, tre frue, en 1955. Dankon, amiko Alcibiades, pro via emociiga letero, kaj akceptu nian kondolencan pro tiel granda perdo kia sendube estis la forpaso de via frato.

HEF bonaj servoj

50



En 1997

HEF bonaj servoj



Viglas la movado

Du mil dolara premio

15

Nova literatura premio en Esperanto "Francisco Máñez" naskiĝas en Cheste (Valencio, Hispanio). La unua kaj sola premio konsistos el 2.000 usonaj dolaroj. Ĝi estos transdonita al la gajninto en Valencia, okaze de la 7a Internacia Esperanto-Kongreso. Interesiĝantoj petu la regularon al: Sociedad Cultural Ateneo "La Alianza". Plaza Doctor Cajal, 11. ES-46380 Cheste (Valencia), Hispanio.

Universitato de Valencio

Por la dua fojo ene de la sama jaro, pro la sukceso de la unua, okazos kurso de Esperanto en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencio (Hispanio). La akademia valoro de la diploma daŭre restas je du kreditoj. La profesoro denove estos Augusto Casquero.

Andaluzaj bibliotekoj

La Ĝenerala Asembleo de AEU komisiis samideanojn Martín kaj Rodríguez pri la tasko studi la eblecon donaci al andaluzaj bibliotekoj librojn pri Esperanto. Se vi deziras kunlabori mone, sciigu tion al Andaluzia E-Unuiĝo, aŭ uzu ĝian bankkonton.

AEU en la reto



Ekde oktobro viziteblas jam la paĝaro de AEU (<http://www.redestb.es/personal/delpozo/>), dokumentaro dulingva (en la hispana kaj en Esperanto) kiu celas diskonigi kaj Esperanton, kaj Andaluzion, kaj, kompreneble, la asocion.

Zorgas ĉi tiun novan servon de AEU la redaktoroj de Gazeto Andaluzia, samideanoj J.M. Rodríguez (atingebla per la e-posxta adreso joser@lander.es) kaj J.F. Martín (delpozo@redestb.es).

La paĝaro disponas ligilon al multaj aliaj E-paĝaroj, tiel ke oni povos viziti la paĝaron de UEA, AERA kaj aliaj asocioj, aŭ ricevi Esperantajn literojn el la paĝaro de Flandra Esperanto-Ligo.

AEU intencas kreskigi la paĝaron tujtute. Ekzemple, per perkorespondan (pli ĝuste, pere-poŝtan!) E-kurseton.

Euskio

Iñaki Gauna kaj Joxe Mari Sarasua prelegis pri la problemoj troveblaj ĉe la tradukado el esperanto en la eŭskan, ene de la traduka fako de UEU (Eŭsklingva Somera Universitato). Malgraŭ la ne

taŭga horo kaj la varmego, ili sukcesis kapti la atenton kaj la scivolon de la ĉeestantoj.

AEA dekjarigo

Rezulte de profunda debato starigita dum la unuaj monatoj de la jaro, oni interkonsentis relanĉi la agadon de AEA per celebrazo de ĝia dekjara datreveno. Kelkaj aranĝoj estis prikonsiderataj: ekspozicio en publika halo, peto de "Esperanto-straton" al la Urbodomo, koncerto de e-muzikgrupo, omaĝo al veteranaĵ e-istoj, eldono de rakontoj de la loka verkisto Ignacio Aldekoa, ktp.

Festotago de

D-ro L.L.Zamenhof

Kiel kutime ĉiujare, oni celebris en preskaŭ ĉiu E-Grupo de nia lando la Festotagon honore al D-ro Zamenhof: kroniketoj raportantaj pri ĝi oni ricevis en la Redaktejo de *Boletín* de multaj Esperantaj Grupoj: prelegoj, ekspozicioj, komunaj tagmanĝoj aŭ vespermanĝoj ktp. En kelkaj E-rondoj la omaĝo al D-ro Zamenhof koincidis kun la Festo al la Libro, kio sendube kontribuis plibriligi ĝin kaj doni aldonan kulturan signifon al la evento. Mi ne mencias ĉiun el ili, ja mi volas forgesi nenion el niaj informintaj rondoj.

La novaĵo en la Festo de la Zaragoza rondo estis la aĉeto de la nova disko *Esperanto* fare de multaj zaragozaj esperantistoj. La sukceso estis kompleta!

Feliĉon kaj Prosperon al ĉiuj hispanaj E-rondoj laŭlonge de la Nova Jaro 1997!

Asturio

40 asturaj e-istoj kaj 6 kantabraj kunvenis en Gijón. Unue oni vizitis la straton Esperanto por almeti florbukedon al la afiŝtabulo. Pri tio raportis la loka televido. Post meso en Esperanto, prelegis s-ro Miguel Gutiérrez pri aspektoj de la nuna hispana movado. Fine oni ĝuis la kutiman bankedon.

Amaskomunikiloj

Al la redaktejo alvenis multaj informoj pri intervjuoj al e-istoj ĉe diversaj radiostacioj. Ekzemple oni intervjuis Miguel Fernández por *Radio Continental* kaj ankaŭ por *Radio Voz*, ĉi-foje kune kun Miguel Gutiérrez, okaze de la apero de la disko "Esperanto".

Tre bele aranĝitan informon kun muziko kaj pecoj el "Mazi" elsendis dufoje la tutnacia Radio 5, kaj intervjuon al Marcos Cruz elsendis la programon *Contigo en la distancia* de Radio 1.

En la pinta programo "¡Sorpresa, sorpresa!", aperis interesa mencio pri Esperanto, kaj, kompreneble, laŭlonge de novembro kaj decembro aperis pli ol 200!!! reklamoj pri la disko "Esperanto" en la ĉefaj televid-kanaloj, kune kun mi-**loj** da disaŭdigoj de la kanto *Astro Jupiter*, spicitaj per klarigoj pri nia lingvo, en la ĉefaj radiostacioj de nia lando.

Tago de la Hispana E-Muzeo

17

La 17an de novembro 1996, en kunveno okazinta en Sant Pau d' Ordal sub la nomo "Babiladoj" (kvazaŭ nomada esperantista parlamento) oni decidis starigi specialan tagon ĉiujare por omaĝi la taskon kaj celon kiu disvolvas tiu ĉi Muzeo. Oni prezentis la proponon al la Direktoro, s-ano Luis Mũ Hernández Izal, por celebri la *Tago-n de la Hispana Esperanto-Muzeo* la trian dimanĉon de ĉiu monato junio, kion li plezure akceptis.



Pli ol kvardeko da geesperantistoj partoprenis en tiu kunveno, kiu proponis la koncepton *Libereco* kiel ĉeftemon. Nu sendube tre alloga temo por debato sed sufiĉe malfacile difinebla same sub vidpunkto de la ideoj kiel de la politiko, de la teorio kiel de la pragmata vivo. La debato longe daŭris kaj kvankam la partoprenantoj en la diskutado sin apogis en konceptoj ne ĉiam koheraj kun la ĉeftemo kiel kulturo, edukado, socia kunvivado, eĉ pri la libero de la bestoj, la plej grava celo de la kunveno efektiviĝis: paroli en Esperanto, "babili"...

Je la fino de la debato, kvazaŭ pozitiva konkludo, oni proponis kaj konsen-

Vizitu nin per via komputilo

<http://home.adv.es/esperanto>


HEF en Internet

tis tion kio aperas je la komenco de tiu ĉi raporto: starigi la *Tago-n de la Hispana Esperanto-Muzeo*, aklame aprobata de la ĉeestantaro.

La kunveno finiĝis per invito de la gegastigantoj S-roj Hernández-Massana al malavara lunĉo, en kiu oni tostis per loka ŝaŭmvino, prestiĝa en la tuta mondo.

Rekomendindaj gratuloj kaj dankoj al la Direktoro de la Muzeo, ne nur pro la giganta organiza laboro kiun li jam faris, sed ankaŭ pro la tasko kiun li ĉiutage plenumas. La Redakcio de *Boletín* esprimas jam sian dankon al nia samideano kaj amiko Luis, la Direktoro, kaj esperas ke granda plimul-to da esperantistoj kiuj bone profitis la servojn de la Muzeo ankaŭ esprimos al li similan dankan senton al lia adreso: S-ro Luis MŬ Hernández Izal; str. Zamenhof, 12. 08937 Sant Pau d' Ordal (Barcelona). Hispanio.

(Laŭ raporto de Santiago Torné i Grau)



Prelegoj en BEC

Laŭlonge de la jaro Barcelona E-Centro organizas plurajn kulturajn aranĝojn. La 26an de novembro prelegis en la sidejo de BEC, pri la temo "Kial progresas ĉiuj sciencoj escepte de Ekonomiko?", samideano Marti Guerrero, kiu aperas en la centro de la foto akompanata de Salvador Aragay kaj J. M. Galofré.

Ofertoj kulturaj kaj turismaj

Esperanto, Regiona Societo de Poprad ofertas naŭ allogajn interesajn aranĝojn dum 1997a: Amika kunestado por esperantistoj, Printempa esperantista renkontiĝo en Altaj Tatroj, Bussekspedicio al Karpatoj de Marmaroŝ en Rumanio, Somera Esperanto Lernejo, Turisma semajno en Altaj Tatroj, Mikologia seminario, Sankt-Nikola Festerenkontiĝo, Silvestra Balo-Vintraĵ Ekskursoj, Diversaj turismaj, kulturaj kaj fakaj aranĝoj. Informiĝu ĉe: ESPE-RANTO, Sobotské námestie 36. SK-058 01 POPRAD, Slovakio.

Grava Ekspozicio

Ĉeĥa Centro en Varsovio, kunlabore kun Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj Muzeo de Jan Amos Komensky el Prerov (Moravio) kaj Pola Esperanto Asocio aranĝos la ekspozicion, de la 28a de marto ĝis 30a de aprilo 1997, kiu ebligos al vizitantoj vidi, aŭdi kiel ekestis ideo de Internacia Lingvo, kiel ĝi realiĝis, disvastiĝis kaj kiel ĝi sukcesis, sub titolo

De novembro Esperanto ĉiutage aŭdiĝas en muzik-radioj de tuta Hispanio pere de disko titolata *Esperanto*, kiun eldonis Warner Music Spain. Ĉiu-



De Komenio ĝis Zamenhof.

Informoj pri tiu aranĝo vi povas peti al: Ing. Frederiko Jerábek, Fugnerova 18, CZ-290 01 PODEBRADY, Ĉeĥio.

tage la hispana televido propagandis ĝin kaj, kvankam oni anoncis ke ĝis januaro oni ne vendos la diskon, la vero estas, ke en decembro jam oni vendas ĝin en la grandaj magazenoj: *Continente*, *Prica*, *El Corte Ingles* k.a. La prezo varias, laŭ la vendejo: de 2.300 ĝis 3.200 ptoj.

Kongreso de

Valencia E-Federacio

kaj Murcio

La 19a kaj 20a de aprilo 1997 okazos en Benidorm (Alicante) la 7an Esperanto-kongreson de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio, kiu, kiel kutime, analizos la E-Movadon en la regiono kaj programos sian venontjaran aktivadon. Konsultoj kaj konstanta kontaktadreso: José Miguel Bernabeu Egea; Plaza Pio XII, 1.-4Ŭ C. 03012-ALICANTE.

Internacia E-Konferenco

Ĉe marbordo, en Rafina, Grekio, de la 12a ĝis la 18a de julio 1997 OSIEK organizas Internacia Esperanto-Konferenco-n. Ĉestemo: "Helenaj influoj en la mondkulturo", debato kaj voĉdonado por OSIEK-premio.

Post la Konferenco tritaga krozado ebligos ĝui la ĉarmon de la grekaj insuloj. Informoj kaj aliĝoj: Mantha Christou, Pericleus 19, N. Psychiko, GR-15451 ATHINA, fax. + 30 (1) 3236746.

La "Kolekto aprobita" reaperos

Responde al la alvokoj en kelkaj gazetoj ripete faritaj de mia kompilfrato R. Hauptenthal, pliaj ĝis nun nekonataj inkunabloj nin atingis. Dank' al diversflanka helpo ni do povis kolekti 115 pecojn el la 118 inkunabloj tiel, ke el ĉi antikvaj memorindaĵoj nun restas fantomaj nur tri pecoj.

Post feliĉa fin-kompilado de tiuj 115 pecoj raregaj, mia agema eldonfrato Hauptenthal bonvolis proponi al mi, ke ni aldone aperigu ankaŭ la tuton de la fama *Kolekto Esperanta* aprobita de Zamenhof, ĉar ankaŭ ties titoloj estas por ni nemalhaveblaj fosilioj el tiu jam fora tempo, kiam nia lingvo ĝermis kaj enradikiĝis. Ege konvena konsilo por plene kompletigi nian "ludovikologian dokumentaron". Kvankam mi nun estas tre skeptika pri la akiro de necesaj rimedoj por tia granda entrepreno, tamen ni

povos almenaŭ prepari nin por tiu frandinda eldono.

Ni do antaŭvidas kvin pliajn volumojn en la ludovikologia serio (LD 20-24). Por tiu kolekto ni bezonas la unuajn eldonojn aperintajn en la Kolekto Aprobita. Kiu posedas tiajn materialojn, bv. sin turni al mia konstanta helpanto: S-ro Reinhard Hauptenthal, Schulstr. 30, D-66133 Saarbrücken, Germanio. Tel./fakso: + 49 681 816713.

Itô Kanzi

Utnoa katalunlingve

La eksterordiaro verko de Abel Montagut Poemo de Utnoa aperis en la kataluna lingvo. Jen nova sukceso de nia brila verkisto, kies nova verko "Karnavalo" baldaŭ vidos la lumon en Vieno, ĉe la eldonejo IEM (antaŭe Pro Esperanto). La kataluna versio ne havas versan sed prozan formon, laŭ aparta deziro de la eldoninto. Tamen ĉiu katalunlingva leganto sendube ĝuos ĝin.



Hispana Esperanto Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 3^o - 7
ES-28015 Madrid
Tel. + Fakso: 91-446-80-79
esperanto@canaldinamic.es

Okaze de sia 50-jariĝo HEF lanĉas novan servon: **Perkoresponda Kurso**

Ĝi konsistas el la *lernolibro*
Esperanto, Curso del Idioma Internacional
de Miguel Gutiérrez Adúriz;
la *informlibro*

El Esperanto: fenómeno de la comunicación
de Willian Auld;

kasedo kun ĉiuj konversacioj de la lernolibro,
kaj la tuta ekzercaro preparita por solvado.
Ĉiu lernanto ricevos senpagan unuĵaran aliĝon al HEF

La dek plej belaj vortoj en etnolingvoj kaj arteraritaj lingvoj

21

Bernard GOLDEN

Rezultoj de enketoj

De tempo al tempo estas organizita enketo fare de indiciduoj aŭ periodaĵoj por trovi la dek plej belajn vortojn en diversaj lingvoj. En la fruaj 1930aj jaroj la franca poeto Paul Valéry respondis la demandon en franca revuo per tiuj ĉi dek vortoj: Pur: pura. Jour: tago. Or: oro. Lac: lago. Pic: montopinto. Seul: sola. Onde: ondo. Feuille: folio. Mouille: rivereto. Flûte: fluto.

En 1952 alia franca revuo, *Vie et Langage*, anoncis konkurson por ekscii la dek plej belajn francajn vortojn, kaj tiam la premiita deko estis la sekvaj: Cristal: kristalo. Marjolaine: majorano. Amour: amo. Maman: panjo. Aurore: aŭroro. Murmure: murmuro. Libellule: libelo. Azur: lazura. Emeraude: smeraldo. Gazelle: gazelo.

Post publikigo de la listo kompilita de Paul Valéry, alia poeto, la hungaro Dezsó Kosztolányi, prezentis sian elekton de la dek plejbelaj hungaraj vortoj: Lang: flamo. Gyöngy: perlo. Anya: patrino. Osz: aŭtuno. Azsž: virgulino. Kard: glavo. Csók: kiso. Vér: sango. Sziv: koro. Sír: tombo.

Du jardekojn poste, en 1957, la hungara magazino *Fšles* invitis sian legantaron konkursi pri la sama temo, kaj en la opinio de la juĝkomitato, jenaj vortoj meritas la titolon *La dek plej belaj*. Csend: silento. Csillag: stelo. Fény: lumo. Gyöngy: perlo. Illat: aromo. Köny: larmo. Lömb: foliaro. Szélid: milda. Szello: venteto. Tšnder: feino.

En 1982 la prestiĝa sudamerika gazeto *El Mercurio* de Santiago, Ĉilio, formulis la saman demandon pri la dek plej belaj hispanaj vortoj. Jen la rezulto de ĝia enketo: Libertad: libereco. Madre: patrino. Paz: paco. Esperanza: espero. Amor: amo. Mar: maro. Azul: lazuro. Dios: dio. Belleza: beleco. Amistad: amikeco.

Kun iom da prokrasto ankaŭ mi aliĝis al la enketo de *El Mercurio* kaj faris provon elcerbigi la propran liston de la dek plej belaj vortoj en la hispana lingvo: Páramo: stepo. Rorra: knabino. Alegría: feliĉo. Sueño: dormo. Carmesi: karmezina. Aurora: aŭroro. Estrella: stelo. Lámpara: lampo. Marfil: eburo. Dorado: orkolora.

Plej probable la unua esperantisto, kiu publikigis liston de la dek plej belaj vortoj en Esperanto, estis la hungara beletristo Kolomano Kalocsay en 1970. Al sia unua listo li aldonis ankaŭ dek neologismojn, kiuj liaopinie same meritas premion pro beleco. Unua listo: balza-


mo, ĉarma, lamento, lampiro, larmo, luli, mielo, svelta, veluro, vualo. Dua listo (neologismoj): delico, filandro, friska, kantileno, lanta, linda, lirli, lontana, suspiro, svaga.

Kiam en 1983 Jorge Camacho Cordón lanĉis sian enketon inter esperantistoj, mi sendis al li jenan liston: Revi, aŭroro, krepusko, lumo, lazura, kalma, mola, tenera, lariko, alko.

Sonsimbolismo

Laŭ mia scio, la sola planlingvisto, kiu faris provon krei tutan lingvon laŭ estetika kriterio, estis Teo Jung, la fondinto de la gazeto *Heroldo de Esperanto*. En lia romano *Landoj de l' Fantazioj* (1927, Horrem), unu el la rolantoj elpensis idealan lingvon, kiun oni parolis en la fantazia lando Raspaza. Jen kiel la aŭtoro priskribas ĝian fonetikan strukturon.

«La vortoj estis konstruitaj laŭ la impreso de la sonoj, kio estis precipe valora por la poezio. Ekzemple, la vokalo “u” impresas malhele, obtuze-ĝi do troviĝas en vortoj kiel nokto, malhelo, doloro, tamburi, profunda ktp.; “i” kutime impresas heleĝi taŭgas por esprimi vortojn, kiuj signifas lumon, ĝojon, altecon, ktp.; “o” impresas grandioze, plene; “a” trankvile, simple; “e” larĝe, aŭ malbele kaj ordinare. Simile la konsonantoj: “l” estas la facila, milda, lulanta; “r” la potenca, granda, rulanta; “n” la neanta, ktp. ktp.» (Teo Jung, Ĉiu-ĉiun, 1979, pĝ. 380; *Landoj de l' Fantazioj*, pĝ. 83)



Aliaj artefaritaj lingvoj

Mi scivolas pri la dek plej belaj vortoj en aliaj planlingvoj: Volapuko, Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Neo, Intal, Eŭrolatin ktp. Kelkaj interesaj demandoj prezentigas:

1.—Ĉu estas eble trovi belajn vortojn en aprioraj lingvoj?

2.—Ĉu la vortoj en naturalismaj planlingvoj estas pli belaj ol tiuj en lingvoj de la skemeca tipo?

3.—Kiu el la sekvaj faktoroj dominas en la elekto de la dek plej belaj vortoj en etnolingvoj kaj ankaŭ en planlingvoj?: (1) la eŭfonio de la fonetika sistemo, (2) la semantika enhavo de la vortoj, (3) la asociado de ideoj?

Mi finas mian prezentadon de tiu ĉi temo per listoj de dek belaj vortoj, kiujn mi trovis en la vortoprovizo de tri planlingvoj:

Volapuko: Mel: maro. Smil: rido. Plim: komplimento. Kid: kiso. Flen: amiko. Seil: silento. Lan: animo. Solik: suna. Glol: gloro. Evelo: iam.

Suma (apriora): Tala: sana. Zino: vento. Fesa: softa. Bolo: floro. Lino: maro. Sele: luno. Vila: blua. Kari: zorgi. Suna: libera. Pana: blanka.

Loglan (logika lingvo): Kalsa: silenta. Sakta: sukero. Matma: patrino. Gal:

oro. Fasru: facila. Tarfo: stelplena. Litla: lumo. Malna: lakto. Skesa: kisi. Lalva: hulo.

Pensinstiga lingvo-ekzerco

Mi proponas al la legantoj de *Boletín*, ke ili cerbumu por fari siajn proprajn listojn de la dek plej belaj vortoj en la hispana lingvo kaj ankaŭ en Esperanto. Se ili sendos ilin al la Redakcio, eble la plej trafaj listoj estos publikigitaj sur la paĝoj de la revuo.

Eta promeno tra la gastronomio de PIV

Pledo por bujabeso*
aŭ Kio estas labskaŭso?

Reinhard Haupenthal

De tempo al tempo la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto, Werner Bormann, elpaŝas kun artikoloj kaj prelegoj pri la Esperanta terminologio. Ĉiufoje la klimakso de lia rezonado estas la malnova melodio pri (aŭ kontraŭ) neologismoj. En sia ĵusa intervjuo *Esperanto aktuell* 15. 1996: 4, p. 1-2) li eĉ citas sin mem ateste pri la praveco de sia sinteno: «La bujabesismo estas minacanta danĝero». (p. 2)

Nu, ni turnu rigardon iom pli profunden al la temo.

Kio estas faklingvo? Ĉi demandon ne respondas Werner Bormann, sed liaj

ekzemploj montras proksimume kion li celas: ekonomiko, fervojistiko, medicino, kredeble do la naturaj kaj sociaj sciencoj. Li konkludas: «Tio montras, ke eblas multon jam fari en Esperanto sen suferi pro manko de terminoj». (p.3) Kaj iom poste, sampaĝe: «Tiuj ĵus menciitaj kaj pruvitaj kapabloj estas konvinkaj argumentoj, ke la faka esprimkapablo en Esperanto jam estas eminenta».

Plurkiale, mi dubas la verecon de ĉi asertoj. Ili baziĝas sur tre nefirma grundo. Konkludi el la ekzisto de kelketaĵ broŝuroj (precipe propraj) kaj terminaroj (kutime magraj kaj eksmodaj) pri la universala kapablo de Esperanto, rivelas

pli la propagandiston kun dezirinklina pensado ol la realiston kiu frontas la problemojn kiel terminologio aŭ tradukanto. Laŭ Bormann el la "kapvortoj" de PIV (kredeble la morfemoj) «facile fareblas 150000 vortoj». Sed ĉu per tia lingva abrakadavro (1) oni kreas terminojn kaj faklingvon? Dube! Ĉu la profesora teamo de AIS verkas siajn sciencajn librojn en Esperanto? Tute ne! Ĉu la esperantisto-Nobel-premiito antaŭe publikigis en Esperanto? Neniel!

Kontraŭe al la piaj deziroj, la situacio de la faka lingvo (tiel la terminologia kiel la scienca literaturo) estas mizera. Multaj sciencoj apenaŭ aŭ tute ne reprezentigigas nialingve. Ekzistas nul serioza verko teologia aŭ literatur-sciencia, se citi nur du ekzemplojn.

Sed io alia timigas en la artikolo de Bormann: la maniero en kiu li volas krei terminojn. Li asertas: «Plej grave estas, ke la Fundamentaj elementoj de Espe-

ranto proponas sian vortmaterialon». Anstataŭ la vorto *kontenero* (neologismo laŭ Bormann) li proponas *kestego* (ne registrita de PIV ajna-sence). Jen kiel oni volapukigas internaciajn elementojn por maltuja rekoneblo kaj tuja ridindigo de la lingvo! Laŭ Bormann «la apliko de sufiksoj devus esti la ĉefa rimedo por ricevi novajn terminojn». (p.4) Oni sin demandas, kial li ne volas utiligi ankaŭ la prefiksojn (kp. la utilon de *dessistemigita* de Piĉ). Sed antaŭ ĉio oni sin demandas (retorike, kompreneble) ĉu tiele Bormann ne renversas la tutan leksikan evoluon de Esperanto? La kresko de nia vort-materialo ja okazas tri-voje:

1) per la sistemigo de la afiksa sistemo (inkluzive de la pluapliko de ĝisnunaj t.n. pseŭdo-afiksoj, kiel konvinke montris K. Piĉ -1).

2) per novaj vort-kombinoj.

3) per la kresko de la morfemoj. Forigi la jam ekzistantan materialon signifus do retropaŝon kaj regreson. Ĝustion faras Bormann kaj tiele lia artikolo estas nenio alia ol plia pledo por lingva minimumismo, por ia Bazika Esperanto kaj 900-radika paŭperismo. Proponi tion serioze post pli ol 100-jara lingva evoluo signifas reeniri la lingvan geton kaj propagandi anakronismon.

Bormann volas foranatemii la vortojn *sejmo* (troveblan jam en la pola vortaro de Grabowski el 1910 -2); kaj *primasô* (PIV). Sed evidente sian drastan dehaĉkon li volas apliki ankaŭ al la gastronomio. Laŭ Bormann *bujabeso* “preferinde” (!) nomiĝu “Franca fiŝsupo” (kvazaŭ temas pri supo kaj kvazaŭ ne ekzistus divers-specaj kaj divers-spicaĵ fiŝo-

supoj en Francujo) Kaj jen la hoko en la ezoko!

Ĉu do vanuu el nia lingvo la kuskuso kaj la minestrone, la nokoj kaj la pico registritaj de PIVS aŭ la paĉlo (ankoraŭ ne registrita)? Kaj ĉu la uniformismon lingvan paralelu ia makdonaldismo? Horror-vizio! Mi plu emas aperitivi, por ekzemplo, per ĉampano, moskatelo aŭ ŝereo, per kiro aŭ pastiso, fajfe pri tio, ĉu ĉi lastaj sidas PIVe aŭ registriĝos erst iam poste. Kaj same riĉu la digestivoj (kial, apud aperitivo, PIV ne konas ĉi vorton?). Jen do modesta sortimento: arako, armanjako, ĝino, kirŝo, konjako, sakeo, slivovico (ne en PIV, sed saluton, Lapenna!), viskio (vi scias, se tro, vi skios mave...), vodko... Kaj en tia kadro bonvenas pladoj kaj menuoj ĉiaspecaj. Nulon ni disdegnos, eĉ se —laŭ la timo de Bormann— nia “lingvostoko kre-vus”. Ĉefafero: nia furaĝujo eltenos la regalojn jen premanĝajn, jen ĉefpladajn, jen desertajn. Ni plu bukanu, brezu, brogu kaj dekoktu; ni farĉu, fritu kaj frikasu; ni gratenu, kandizu, maceru, marinu, ni poĉu kaj stufu. Kaj nian soifon ni estingu per cidro, elo kaj klareto, per simpla biero aŭ portero aŭ per punĉo kaj koktelo.

Same kiel la apetito venas dum la manĝo, tiel same ĝi povas veni, kiam la vojaĝo tra PIV vekas nian scivolon: li lernu vortojn kaj konatiĝu kun pladoj. Jen: ameo, andujo, anno, arako, aspiko, babao, barĉo, benjeto, beŝamelo, bifesteko, biskoto, biskivito, blino, botargo, brioĉo, budeno, buĥto (Urban -3), bujabeso. buljono, bulko, cervelaso, ĉatobriando, ĉevapĉiĉo (Urban), ĉipoĉato (Urban), dariolo, draĝeo, edamo,

eskalopo, femurajo, fileo, flano, flaŭno, fonduo (ne en PIV), franĝipano, frikadelo (Urban), frikando, fromaĝo, galantino, grivoj, grujero, grumeloj, gulaŝo, halvao, jahurto, jokano, ĵeleo, kaĉo, kamaboko, kamemberto, kanelonioj, karamelo, kareo, kasuleto, kataifo, kaviaro, kazeo, kefiro, kekso, knelo, kompoto, kondimento, konfitajo, konsomeo, krakeno, krespo, kringo, kuko, kuskuso, kvaso, lasanjo (PIVS, sed lazanjo en PIV), maco, madejro, majonezo, makarono, makaronio, malvazio, manĝuo, marcipano, marmelado, medo, meringo, misoo, moĉio, mortadelo, nudelo, omleto (kaj la grandajn ni nomu senhezite omlegoj), parfeo, pemikano, pikloj, pilaflo, polento, porigo, pralino, pureo, raguo, raĵniĉo (Urban), rakledo (ne en PIV), ratafio, raviolo, remolado, rijeto, risolo, rizoto, rokforto, rulado, rumo, rumsteko, saguo, sakeo, salamo, saŭrkraŭto (la preferata plado de la dinosaŭroj), savarino, semolo, sojo, spagetoj, steko, sufleo, sukijako, ŝaŝliko (Urban), ŝereo, ŝorbeto, tataro, tempuro, timbalo, toasto, tohuo, toŭfuo, turnedoso, vaflo, vermiĉeloj, vodko, volovano k.m.a.

Ju pli kreskos la nombro de Esperantaj kuirlibroj, des pli kreskos ankaŭ la gastronomia terminaro. Nature kaj necese. Kaj eble, kiu scias, la nova prezidanto de la Akademio, sukcesos vulgariĝi eĉ novan tian terminon el sia kuirejo hamburga. Tiam *labskaŭso* — 4) pace kunekzistos kun bujabeso kaj restariĝos la harmonio de la kontraŭdiroj...

(*) Responde al Werner Bormann: La faklingvo en Esperanto. En *La letero*

de l' Akademio de Esperanto. 1994: 26, p. 3-5; iom aliortografie ankaŭ en: *Esperanto* 87, 1994: 1060 (6), p. 106-107. Ĉi saman temon Bormann regurdas en: *La stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto*. Red. Petr Chrdle. Praha: Kava-Pech (1995). 191 p. (p. 57-71: Defio faklingvo.)

1) En la postparoloj al siaj beletraĵverkoj kaj laste en la kolekto de siaj esperantologiaj eseoj: *La interna vivo de Esperanto*. Saarbrŭcken: Iltis 1995. 401 p.

2) Antoni Grabowski: *Słownik języka Esperanto. Granda vortaro pola-Esperanta*. Warszawa: Arct 1910. 553 p. (Represo: Varsovio 1990).

3) Erhard Urban: *Gastronomia terminaro*: Rotterdam: UEA 1958. 125 p.

4) W.B. mem difinis ĝin jene: ŝipkuireja restmanĝajo. La Duden-vortaro difinas pli precize: malnova plado marista konsistanta el pureo el bovaĵo, terpomoj kaj cepoj, miksitaj kun dispecigitaj ruĝaj betoj kaj acidaj kukumoj, kun kio oni manĝas frititajn ovojn. La etimologion oni asertas neklara, sed la latva vortaro de Jaunvalkis kaj Gutmanis konas la vortojn labs kaj kauss...

Glosoj:

abrakadabro (NG) Sorĉo-vorto.

armanjako Vin-bera brando fabrikata en Armanjako, malnova regiono de la sud-okcidenta Francujo (hodiaŭ en la departemento Gers).

Digestivo Likvoro aŭ brando kiun oni drinkas fine de manĝo.

Fonduo Manĝo preparita el grujero fandita en blanka vino. —Burgunda—: plado konsistanta el— etaj pecoj de

bovajo plonĝigataj en bolantan oleon kaj akompanataj de diversaj saŭcoj.

Kiro Miksaĵo el blanka vino kaj riba likvoro, ĝenerale servata kiel aperitivo. De la nomo de kanoniko Kir (1876-1968), urbestro de Dijono.

Paelo Hispana plado komponita el rizo safranumita, kuirita en pato kun mistuloj, krustacoj, koko-pecoj, diversaj legomoj.

Pastiso. Alkoolizita drinkaĵo surbaze de anizo drinkata aperitive kun aldono de akvo. (GDFE).

Rakledo 1. Fonduo farita el kvarono de fromaĝo elmetata al varmo-fonto kaj de kiu oni skrapas la surfacon laŭ la mezuro de fandiĝo; 2. la fromaĝo mem utiligata por ĉi plado.

Slivovico Prun-brando.

Mallongigoj:

GDFE Grand Dictionnaire Français-Esperanto. (Paris 1992)

NG Neologisma Glosaro de Henri Vatré. (Saarbrücken 1989)

PIV Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (Paris 1970)

PIVS Suplemento de PIV. (Paris 1987).

UEA Universala Esperanto-Asocio.

R. Hauptenthal



La kazo de Bonaero

LOKNOMOJ KAJ
AKADEMIANOJ

Humphrey Tonkin

Prezidanto de la Universitato de Hartford. Usono.

Pro koincido de du kunvenoj, mi ne povis partopreni la ĉi-jaran dumkongresan publikan kunsidon de la Akademio de Esperanto. Ŝajnas, tamen, ke kiel kutime, kaj malgraŭ la saĝa gvidado de la nuna prezidanto, la Akademianoj ne fariĝis la ĉeestantojn, nek inverse. Laŭ raportoj, la diskuto fariĝis iomete pli vigla kiam unu Akademiano demandis kial entute oni havu Akademion, sed ja ne temis pri energia debato. Eble tio estas neevitebla: diskutoj pri la utiligo de tiu aŭ alia vorto en Esperanto, aŭ tiu aŭ alia esprimo, ne nepre kaptas la atenton de ordinaraj homoj, kiuj preferas uzi la lingvon anstataŭ paroli pri ĝi.

La utiligo de la lingvo estas la ĉefa motoro de ĝia ŝanĝiĝo kaj evoluo. Vortaristoj kaj terminologoj povas helpi, precipe tie kie ne jam ekzistas akceptebla vorto por iu objekto aŭ koncepto, kvankam eĉ en tiuj kazoj ordinaraj uzantoj ofte estas pli bonaj eltrovantoj de novaj kunmetitaj formoj ol estas la filologoj kaj etimologoj. Ankaŭ foje Akademianoj povas helpi — se ili limigas sin al fikso de principoj de lingva evoluigo kaj rezistas la tenton klopodi per per esoteraj argumentoj konvinki la publi-

kon iel ŝanĝi sian direkton. La historio de lingvoplanado kaj lingvo-politiko (mi aludas al tiu profesia fako, kiu laboras ĉefe kun ekzistantaj lingvoj, do ne pri la planado de kompletaj novaj lingvoj) estas plena je skeletoj de fakuloj, kiuj klopodis ŝanĝi la ĉiutagan uzon de lingvoj. Malgraŭ la populara antaŭjuĝo, eblas ŝanĝi burokratojn, almenaŭ se temas pri lingvouzo, ĉar ili emas sekvi regulojn — sed estas pli malfacile fari ŝanĝojn en la vespermanĝa konversacio de ordinaraj homoj.

Tie kuŝas fundamenta problemo por la Akademio, instanco en kiu mi jam membras kelkajn jarojn. Tro ofte la ĉefaj kvalifikajoj por fariĝi Akademiano ne estas engaĝiĝo en la ĉiutaga vivo de la Esperanto-movado (aŭ, por uzi pli teknikan kaj pli taŭgan terminon, la Esperanto-parol-komunumo), sed klereco pri lingvistiko kaj rilataj kaj rilataj demandoj. La Akademianoj, kiuj partoprenas Universalajn kongresojn, estas eĉ inter la esceptoj: la Akademio neniam havas plimulton de sia membraro en kiu ajn sia kunsido, kaj ĝenerale la Akademianoj, kiuj mem atingis altan klerecon en siaj fakoj per efika pritrakto de skribitaj tekstoj kaj bone orientiĝas en mondo kie regas la skribo, preferas tiun mondon de skribadoj, kie regas ordo kaj kombiteco, kontraste al la manko de dresiĝo, kiun oni trovas en sendisciplinaj parolaj medioj. Malgraŭ tio, ke mi estas regula vizitanto de Kongresoj, kaj aktivulo ĝenerale en la Esperanto-movado, plurajn Akademia-nojn mi apenaŭ iam ajn renkontis.

Bernard Golden, kiu lastatempe kontribuis al *Internacia Ĵurnalisto* interesan

artikolon pri la «ĝusta» Esperanta nomo de Buenos Aires, certe ne estas inter la neaktivaj Akademianoj: li multe legas en Esperanto, kaj li ne nur kontribuas studojn kaj studetojn abunde al gazetoj, sed ankaŭ estas inter niaj plej interesaj kreaj verkistoj. Krea verkisto, kiu kutimas priskribi la ordinaran vivon de ordinaraj homoj, devas bone senti la sonaron, la bruon, de la socio: bona novela aŭ drama dialogo fontas ne el libroj sed el parolaj kutimoj. Tamen, la aliro de Golden al la demando de geografiaj nomoj, almenaŭ en tiu ĉi kazo, ŝajnas al mi tro odora (aŭ parfuma) je la studejo kaj je klerula inko: ĝi ne donas sufiĉan atenton al la praktikaj bezonoj de praktikaj esperantistoj.

Kvankam mi samopinias kun li, ke foje estas utile konsideri la historion de difinitaj esprimoj, precipe se oni proponas tute novan terminon por tute nova fenomeno, tiu ne estu la komencopunkto de la afero, precipe se temas pri geografiaj nomoj. Antaŭ kelkaj jaroj la Akademio dekretis, ke la lando, kiun la esperantistaj enloĝantoj nuntempe konas Koreio, estu efektive Koreo, kaj ke Ukrainio estu Ukraino. Ili fundamentis sian decidon sur abundajn historiajn «pruvojn» el skribitaj tekstoj el la fruaj jaroj de la lingvo — sed ili ne adekvate konsultis la nuntempajn ĉefajn uzantojn de la terminoj, nome la enloĝantojn de la landoj. La ridoj kaj la furiozo (en proksimume egalaj kvantoj), kiujn produktis tiu decido, eĥis de unu Poluso al la alia. Simila sorto atendis plurajn proponojn de d-ro André Albault, la tiama prezidanto, pri aliaj geografiaj nomoj.

Ni, kiuj vagas en la Esperanto-medio

inter parolantoj de la lingvo, sentas certan frustigon antaŭ tiuj inkokovritaj doktuloj, kiuj insistas, ke ni ŝanĝu nian parolmanieron. Lastatempe, Wouter Pilger, en la gazeto *Survoje* (3/1993, pĝ. 11), plendis kontraŭ la insistado de s-ro Golden pri la uzo de la vorto “junglo” anstataŭ la multe pli vaste uzata “ĝangalo”: «Se ĉie ĝis nun oni renkontis *ĝangalo* por praarbaro, kian sencon do havas aserti... ke *junglo* estas pli taŭga?» La energia (kaj, se mi rajtas tion diri, interpreteble supereca) s-ro Golden respondis en la septembra-oktobra numero de *Boletín* de 1996 per tuta amaso da citaĵoj el diversaj vortaroj kaj beletro (inkluzive la propran) por montri al la “povra Pilger” (tiel priskribita), ke li “mizere mispaŝis”. Se oni tratranĉas la skolastikon kaj la malafablon (kial en Esperantujo tiel necesas insulti homojn kiam oni malkonsentas kun ili?), la tute saĝa demando de Pilger restas: tiuj, kiuj ĉiutage uzas la lingvon jam havas sian vorton, kaj ne estas tre utile citi skribitajn fontojn por konvinki la 99 procentojn de kompetentaj Esperanto-parolantoj, ke ili nun ŝanĝu sian praktikon.

Ni lernu el la kazo korea, ke Esperanto estas vivanta lingvo, *kaj vivantaj homoj ĝin parolas*. La esperantistaj enloĝantoj de la argentina ĉefurbo jam de longe nomas sian urbon laŭ difinita maniero (aŭ eventuale laŭ difinitaj manieroj, kvankam mi ne aŭdis aliajn vaste uzatajn formojn), kaj indas foje pesi la konsiderojn, kiuj igis ilin tiel fari siajn decidojn.

Se ekzistas unanimeco pri la nomo de la urbo inter la aktivaj membroj de la parolkomunumo, ne multe gravas kion

ni t.n. kleruloj pensas: la popolo jam decidis. Ni povas konsili kontraŭ la formo, kiun ili elektis, se ĝi estas efektive grava lezo kontraŭ la strukturaj principoj de la lingvo, sed ni prefere tenu niajn fortojn por elbatali tiujn batalojn, kiuj vere gravas, anstataŭ vekti dubojn inter jam konvinkita publiko ĉe ni entute aŭdas, kion tiu publiko diras.

Do principe mi argumentas, ke tien kie la publiko decidis, ni ne intervenu, krom en vere esceptaj kazoj. Esperanto ne estas iu projekto de lingvo, sed vivanta lingvo, kaj ni trompas nin mem se ni kredas, ke oni povas kvazaŭ haltigi la fluon de la Esperanto-vivo por iel replani la nuntempon. Pro tio, cetere, mi estis iom surprizita vidi lastatempe en la paĝoj de *La verda proleto* (julio 1996) novan artikolon de la plumo de Golden pri la demando “komputilo”. Trovinte lastatempe artikolon en *El Popola Ĉinio*, kiu uzas la vorton “komputero”, s-ro Golden proponas, utiligante stereotipan parolturnon, ke ni «sekvu la ekzemplon de la saĝaj orientanoj», kaj li citas diversajn skribitajn fontojn el la jaroj 1967-1995 por pruvi, ke jam de 1967 “komputero” kuŝas jam proponita por uzo de niaj “saĝaj” samideanoj. Sed verdire la popolo jam paroli: “komputilo” estas vaste uzata. Eĉ se al s-ro Golden ne plaĉas tiu komuna vorto por tiu objekto, ne indas plu reeniri la demandon, almenaŭ laŭ mia laika juĝo.

Tamen, mi ne tro kritiku s-ron Golden, kiu ludas esence valoran rolon kiel registranto de leksikaj variantoj en Esperanto, kaj havas je sia dispono bonan superrigardon de la historio de la skriba uzo de vortoj en Esperanto. Se li kaj mi

(kaj amaso da aliaj...) malkonsentas pri difinita vortuzo, mi ne dubas, ke la popolo tute bele sekvas sian vojon ĉiuokaze. Mi eĉ kuraĝus diri, ke la "kaoso", kiun kelkaj homoj rimarkas en la terminologio de Esperanto eble ne estas tiel ĝena ĉe ĉiutagaj vortoj kiel "komputilo" kiel ĉe pli teknikaj terminoj, kie ekzistas aŭtentika ebleco de miskompreno kaj konfuzo. Se la kemiistoj ne interkonsentas pri sia nomenklaturado, la rezulto povas esti efektiva kaoso en la kemia literaturo, sed se ordinaraĵoj homoj ne povas decidi inter "komputilo", "komputoro" kaj "komputero", la eblecoj de miskompreno malmultas kaj neniuj miskomprenos, almenaŭ en ordinara lingvouzo.

Konsidero en tiu rilato la anglalingva "kaoso" ĉirkaŭ la vorto "trotuaro". La britoj insistas, ke tiu objekto estas "pavement" dum la usonanoj insistas, ke ĝi estas "sidewalk". Iel, kaj malgraŭ tiu manko de unanimeco kaj cent aliaj, la britoj kaj usonanoj interkompreniĝas. Britoj parolas pri "aluminium" dum usonanoj parolas pri "aluminum", sed ambaŭ leksikaj tendaroj komprenas pri kio temas. "Kaoso" laŭ terminologo foje estas negrava strangajo laŭ ordinara homo.

Por reiri al la argentina demando, mi suspektas (kvankam mi tion ne certas), ke la demando Buenos Aires estas jam decidita — favore al la formo "Bonaero". Bernard Golden sin turnas al skribitaj fontoj, sendube troveblaj en lia studejo. Sed la skriba Esperanto — certe la publikigita skriba Esperanto — ne estas la plej taŭga fonto de informoj: ĉiam eblas trovi aliajn doktajn esperantistojn, kiuj eksperimente (aŭ senpense) uzas en

sia studejo iun novan formon. Necesas unue rigardi la surlokan praktikon, interalie la parolan.

Jam ĉe *Plena Ilustrita Vortaro*, kiel estas bone sciata, tiu iom ignora sinteno rilate al la parola Esperanto estas evidenta: Waringhien ofte elektas formojn esence preskribajn, do ne priskribajn, kaj ofte ilin proponas (silente, ĉar li ĝenerale ne diferencigas inter efektive akceptitaj kaj laŭ li akceptindaj formoj) kun certa ĉefurba sento de lingva superreco super provincaj regionoj. Lia difino de "ĝangalo" estas bela ekzemplo de tio. Persone, mi esperas, ke la nova PIV pli bone respegulos la efektivan lingvouzon de la Esperanto-socio, kaj donos malpli da spaco al nuraj vortproponoj. Michel Duc Goninaz, kiu gvidas la revizion, lastatempe tre saĝe publike petis konsilojn per demando «ĉu la nomoj de urboj, regionoj, gentoj kaj similaj informoj, menciitaj en PIV kaj rilatantaj al via kutima loĝloko, ŝajnas al vi ĝustaj» (*Eventoj*, marto n-ro 2). Li komencas ĉe la ĝustaj homoj.

La informo de s-ro Golden, ke Buenos Aires origine nomiĝis Puerto de Nuestra Señora Santa Maria de Buen Aire, riĉigis mian historian scion, sed malmulte helpis min en tiu ĉi kazo. La lokulojn influis aliaj konsideroj. Verŝajne la esperantistoj de Bonaero tiel nomas sian urbon interalie ĉar la *sono* de la Esperanta nomo similas la *sonon* de la hispana. La demando do verŝajne jam decidiĝis ne per studoĉambra, skribita Esperanto, sed per la konversacia lingvo de ordinaraĵoj homoj.

Simo Milojeviĉ, iama ĝenerala direktoro de UEA, ofte citas la ekzemplon

de la kompatinda komencanto, kiu demandis al li ĉu efektive la esprimo “profundfrititaj terpom-stangetoj” estas la sola maniero priskribi tiujn objektojn, kiujn la ĉiutagaj parolantoj de Esperanto nomas “fritoj”. Iasence la komencanto pravis, kaj nia ĉiutaga parolanto malobeis minimume deksep Zamenhofajn regulojn, sed dum la komencanto diradis sian komplikan diron, la ĉiutagaj parolantoj jam finmanĝus la vespermanĝon.

La esperantologoj ĝenerale, kaj la Akademio specife, ne donas sufiĉan atenton al la fenomeno de parola kaj populara utiligo de Esperanto, kaj mi mem estas forta apoganto de tio, ke ni urĝe kaj sisteme kreu por ni datenobankon de materialo el la parolata lingvo. Se oni volas kompreni lingvon profunde, oni devas vivi tiun lingvon, kaj Esperanto, malgraŭ sia forta skriba tradicio, ne formas escepton al tiu principo.

Vivi la lingvon signifas interalie interagi kun multaj homoj kun diversaj ideoj, konceptoj, kaj lingvaj fonoj. Persone mi opinias, ke klereco ja *necesas* por Akademianoj, sed ĝi ne *sufiĉas*: niaj Akademianoj estu engaĝitaj en la vivo de la lingvo, kaj plene rekonu (notu, finvenkistoj!), ke vivantan socion oni ne povas facile haltigi kaj redirekti nur ĉar oni havas ŝajne pli bonan ideon. Foje indas klopodi, sed foje ne. La kazo Bonaero, se entute ĝi troviĝu sur nia radarokrano, apartenas al la dua kategorio de aferoj, kiujn ne indas klopodi ŝanĝi.

TTT-paĝoj de HEF en Interneto
<http://hime.ats.es/esperanto>

LITERATURA KONKURSO

En Junio de 1997 aperos la 50an numeron de la revuo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, via *Gazeto Andaluzia*. La respondeculoj de AEU kaj de *Gazeto Andaluzia*, opiniante ke tiu estos grava numero por revuo kiu aperas nur 4 fojojn jare, simbolante do laboron de 12,1/2 jaroj, decidis organizi UNUFOJAN literaturan konkurson, kiun regos jena

-Regularo-

- 1).- Nur eblas konkursi per noveleto(j) originale en Esperanto verkita(j), NE per traduko(j) el aliaj lingvoj.
- 2).- Ĉiu konkursant(in)o rajtas partopreni per tiom da konkursajoj, kiom li/ŝi volas.
- 3).- Ĉiu konkursant(in)o devas sendi tri ekzemplerojn de la konkursajo, tajpitajn laŭ duobla interlinioj, kun la indiko “Konkurso: 50 numeroj de *Gazeto Andaluzia*”. La konkursajo ampleksu maksimume 6 paĝojn, po 30 linioj.
- 4).- La konkursajoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kazi la identecon de la konkursant(in)o. En aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
- 5).- Kune kun la Verdikto, aperos la nomoj de la juĝintoj.
- 6).- La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursajojn estas la 31a de marto de 1997. La Verdikto publikigos en la 50a numero de *Gazeto Andaluzia*, en junio de 1997. Oni diskonigos la nomon de la gajnint(in)o per aliaj gravaj revuoj esperantlingvaj.
- 7).- Oni sendu la tekstojn al S-ro J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malaga, Hispanio.
- 8).- La premio konsistas el 10.000 pesetoj.
- 9).- *Gazeto Andaluzia* rezervas al si la rajton publikigi la venkintan noveleton en sia n-ro 50, kaj en futura TTT-hejmpaĝo de AEU. Ankaŭ la plej bonajn nevenkintajn verkojn oni publikigos en la revuo, laŭ aparta konsento kun la aŭtor(in)o.
- 10).- Ĉiun dubon pri ĉi tiu regularo solvos la juĝantaro laŭ sia bontrovo.

Malago, la 1an de septembro de 1996
 J.F. Martín del Pozo
 Sekretario de AEU kaj de la Konkurso


LA NOVA PAPIRO

Jesuo de las Heras

De kiam MacLuhan parolis pri la Tuta Vizago neni vidis kiel verdira li estis, ĝis la Reto de Retoj aperis. Oni parolas pri *Internet*, kaj la bildo kiun ni ĉiuj havas pri ĝi estas komunikilo malmultekosta kaj efika, kiu kunligas personoj tra la tuta mondo, ĉu vere? Nu, ni ne estu naivaj pri *Internet*, kiel ni ne plu estas naivaj pri informadiko kaj komputiloj.

Por kunligi la reton, ni bezonas modemon, komputilon kaj apartan programon nomitan *naviganto*. Tre disvastigitaj *navigantoj* estas *Netscape* kaj *Explorer*. La unua estas senkosta por studentoj, la dua estas senkosta por ĉiuj, kaj mi ne scius kiu estas pli bona. Ni devas pagi iun *servanton*, tio estas, lokon al kiu ni telefonas pere de nia komputilo-modemo-telefona lineo por sendi kaj ricevi informojn.

Bone, sufiĉe da teknikajtoj! Oni ne devas forgesi, ke tiu ĉi skizo estas por neprofesiaj amatoroj pri informadiko kaj telematiko... De antaŭ tre malmulte da tempo, la telematikamantoj en nia lando uzis lokajn BBS —tio estas, elektronikajn mesaĝarojn— pere de programoj kiel *Telix* aŭ *Termi- nate*, kiu estis bazitaj en DOS kaj kiuj ebligis al ni sendi kaj ricevi programojn, tekstojn elektronikajn kaj mesaĝojn de niaj amikoj kaj konatoj. Poste, ni atingis retojn, sed pli modestajn ol *Internet*. Estis kelkaj diversaj retoj, kaj la ĉefa atingita de ni estas *FidoNet*. Ĉe tiu reto kunvenis



personoj el la tuta mondo, ĉefe de Usono, Britio, Germanio kaj Hispanio. Mi konis kelkajn tre bonajn esperantistojn pere de *FidoNet*. Sed *FidoNet* estas bazita sur BBS, kaj BBS estas vere persona komputilo kun modemo, kies posedanto lasas al siaj *klientoj* uzi ĝin por interŝanĝi informojn kaj programojn. Ni devis, tial, pagi monon al li. Kutime ne estis multe da mono. Ekzemple, mi pagis al *Club-Pc Murcia* 6.000 pesetojn jare.

Dum la tiel nomita *Malvarma Milito* oni malvolvis komputilan programon en Usono konsistantan el komputilo-kunligo pere de modemoj, kvazaŭ temus pri nuklea milito, ĉar ne ĉion oni detruus, la restantaj komputiloj povus daŭrigi la interkonekto post la milito. Tial, la reto ne devus havi *ĉefan nodon*, sed ĉiu nodo devus esti sendependa de la aliaj. La reto uzis telefonan fadenon, sed ankaŭ optikan kablono. Multaj Universitatoj kaj privataj entreprenoj malvolvis apartajn programojn kaj uzis optikan fadenon por interkomunikado, kaj tial la komunikado estas tute senkosta, kaj ili ankaŭ eniris en la reton. Poste, privataj personoj ankaŭ eniris en la reton, kaj kelkaj el ili aĉetis multajn modemojn kaj komputilojn, kaj vendis siajn servojn kiel *servistoj de Internet*. En Usono, la eniro de *Internet* estas tute senpaga, ĉar urbaj telefonkontaktoj estas senpagaj. Ĉi tie, en nia lando, ne estas senpaga, sed estas pli malmultekosta ol telefonado al BBS ekster nian urbon. Nun ekzistas en Hispanio *servantoj de Internet* ĉie pere de *Infovia* kaj aliaj *servantoj*, kiel *Hispanet*.

Internet estas nun pli komprenata pro tiuj programoj kiujn ni nomas *navigantoj*, jam menciitaj. Ili ebligas al ni sendi mesaĝojn kaj kunporti programojn kaj tekstojn, samkiel la malnovaj BBS. Sed ili alportas ion novan, tre mirindan kaj pedagogian: hipertekstajn paĝojn. Oni uzas en Esperanto la mallongigon TTT por aludi ilin. TTT signifas Tut-Tera-Teksaĵo, kaj fakte

estas apartaj tekstoj kiujn oni povas legi pere de nia naviganto, kaj ili enhavas ligojn, tio estas, substrekitajn vortojn aŭ frazojn. Ni povas premi ilin pere de nia *muso* kaj tiam la ekrano iras al alia paĝo, kiu estas eble en alia parto de la Tero. Tiuj paĝoj enhavas tekstojn, fotojn kaj bildojn, kaj ankaŭ muzikon kaj eĉ aŭdeblajn vortojn! La *navigantoj* kiuj ebligas al ni fari tion estas bazitaj en Windows, kaj la lastaj versioj demandas la version 95.

Estas multaj TTT-paĝoj esperantaj en la tuta Tero, kio klare indikas, ke Esperanto estas vere universala! Sed por kontakti iun paĝon oni devas scii ĝian adreson. Adreso havas prefikson, kiu estas *http://*, tiam la literoj *www*, kiuj signifas *World Wide Web* (araneajo tutmonda) kaj poste pliajn literojn difinante la servanton el kiu *pendas* la paĝo, kaj, laste, la literoj kiuj difinas la paĝojn mem. Ekzemple, el mia servanto, Hispanet de Murcia, *pendas* la paĝo kiun mi subtenas, *Esperanto España*. La tuta adreso estas: *http:// www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html*. La difino de la paĝo mem estas *espe.html*, kaj estas *uphm/jesuo* interna organizado de la servanto. La adreso de ĉi tiu estas *mur.hnet.es*, kaj *www* signifas, ke estas en la tutmonda araneajo, kaj *http://*, ke la tuta adreso estas paĝo hiperteksta, ĉu vi komprenis?

Se vi havas komputilon, modemon, naviganton kaj vi havas ankaŭ *konton* en servanto, vi povas tajpi en la adresa fenestro la adreson de *Esperanto España*. Se vi prenas vian muson al iu vorto substrekita, alia paĝo aperos. Se vi elektas *Introducción*, vi vidos enkondukan mesaĝon verkita de samideanino Olga López, kiu klarigas kial tiu paĝo ekzistas. Ankaŭ se vi havas sonan karteton, vi aŭdos belan kanton. Preskaŭ ĉiu parto de la paĝo *kantas*, por fari la aferon pli agrabla. La paĝo estas hispane verkita por alŝiri neesperantiston al nia lingvo, kompreneble. La paĝo enhavas ĉefe hispanajn dokumentojn pri Esperanto, kiel vi povos rimarki se vi

deprenas la vortojn *Pulsa aquí para ir a menú de opciones*. La menuo inkludas enkondukon al Esperanto pere de dokumento klariga: *¿Qué es el Esperanto?*, kiu konsistas el la 25 demandoj kiujn mi ricevis de kiam mi esperantistiĝis ĝis la nuna momento. Tiu dokumento estas ankaŭ tradukita en la anglan, kaj oni atingas la anglan tradukon deprenante la vortojn ĉirkaŭitan kaj substrekitan (Also in English). Por tiuj, kiuj jam scias pri Esperanto, ni eldonas la revuojn *El Correo del Esperanto*, hispane publikigita de Juan Antonio Cabezas Martínez, kaj *Kajeroj el la Sudo*, kiu estas la organo de la Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj kaj kiun mi mem redaktas. Ĝi estas eldonita en Esperanto, kaj eble vi ĉiuj konas ĝin, ĉar la antaŭa redaktoro estis Antonio Marco Botella. En la paĝo vi povas trovi la lastajn du numerojn de *El Correo del Esperanto* kaj la lastajn tri numerojn de *Kajeroj el la Sudo*. La cetero de la paĝo estas interesaj artikoloj pri Esperanto skribitaj de diversaj samideanoj, kiel José Luis Pérez Ovilo, Claude Piron, Ivo Lapenna kaj L.L. Zamenhof. Sub la vortoj *Cultura Esperantista* vi trovos la ok unuajn paroladojn de nia majstro kaj en la originalaj en Esperanto la hispanajn tradukojn. Ankaŭ la himnon de Esperanto, kun la muziko de Ménril kaj la vortoj de Zamenhof, kune kun la hispana traduko.

Vi, kara leganto, povas tajpi mesaĝon al mi dirantan tion kion vi rigardas plej oportuna por plibonigi la paĝon. Sendube la paĝon oni legos tra la tuta mondo, do viaj plibonigoj kontribuos al la efiko de nia mesaĝo, kiun mi jam antaŭdankas.

Mi esperas, ke mia modesta raporto kontribuos helpi vin iom pli scii pri kio estas *Internet*, kaj ankaŭ pri *Esperanto España*. Tiu paĝo estas bona vojo por eniri en la reton, kaj por lerni pri praktika internaciismo!

Kore kaj rete

